

Brazilei

Gvidlibreto
pri la nova
Ortografio
de la portugala

Speciala eldono



Gvidlibreto
pri la nova ortografio
de la portugala

Brazilei

Speciala eldono

Gvidlibreto pri la nova
ortografio de la portugala

Redaktanto: José Roberto Tenório

grafikaranĝo: José Roberto Tenório

Ilustraĵo (lasta kovrilo): Eder Benedetti

kontrollegantoj: José Dias Pinto,
Eurico A. Ribeiro, Conceição Rodrigues

Kunlaboranto: Osmar da Silva Alves

kontakto: revuo@ileibr.org

Marto, 2009

San-Paŭlo

Brazilo

Kuneldonis:



Por sperto kaj lerno ne sufiĉas eterno²

Enhavo

Al la legantoj 07

La portugala en la mondo 09

Brazilanoj travivos novan lingvan reformon 11

Baza gvidilo 15

Historio pri la lingvaj reformoj de la portugala 21

Al la legantoj

La celo de tiu ĉi gvidlibreto estas resume prezenti la ŝanĝojn enkondukitajn en la skribmanieron de la portugala, laŭ la Ortografia Interkonsento de la Portugala Lingvo ratifita de la reprezentantoj de la Komunumo de la Portugallingvaj Landoj, en 1990 . En Brazilo, la Ortografia Interkonsento estis aprobita en 1995, sed ĝia validigo okazis nur la 1-an de januaro 2009 per prezidenta dekreto.

La Ortografia Interkonsento koncernas nur la skriban lingvon; ĝi tuŝas nenian aspekton de la parola lingvo. Per ĝi oni ne forigos ĉiajn malsamecojn en la skribmanieroj de tiuj landoj, kies oficiala lingvo estas la portugala, sed la Interkonsento efikas kiel paŝo survoje al la dezirata unuformigo de la ortografioj de tiuj ok portugalingvaj landoj: Angolo, Brazilo, Givneo-Bisaŭo, Kaboverdo, Mozambiko, Orienta Timoro, Portugalio kaj San-Tomeo kaj Princo.

Ni esperas, ke tiu ĉi gvidlibreto iel estu utila al la enlandaj esperantistoj, kiuj volas rapide solvi dubojn pri la novaj malmultaj reguloj enkondukitaj en la brazilan ortografion, sen neceso zorgi pri teoriaj demandoj.

Agrablan konsulton!
La teamo de Brazilei

La portugala en la mondo



Landoj de la Portugallingva Komunumo:



Angolo



Brazilo



Givneo-Bisaŭo



Kaboverdo



Mozambiko



Orienta
Timoro



Portugaliao



San-Tomeo
kaj Princo

Brazilo travivos plian lingvan reformon

La portugala estas la kvina plej parolata lingvo en la mondo, kies komunumo kalkuliĝas je 200 milionoj da parolantoj. Tial ellaborado de komuna vortaro de la portugala lingvo estas nepra tasko de la Brazila Beletra Akademio pere de ties Konsilantaro pri Leksikografio. Jam eldoniĝis la 5a plej ĝisdata eldono de la ampleksa verko “*Vocabulário Ortográfico da Língua Portuguesa*” – VOLP (Vortaro pri la Ortografio de la Portugala Lingvo), kies vortstoko superas 340 mil artikolojn. Malsame al tiuj ordinaraj vortaroj, VOLP ne prezentas difinojn por la artikoloj. Per ĝi oni celas kapvorte registri la ĝustan skribmanieron de ĉiuj vortoj dokumentitaj laŭlonge de la naŭ jarcentoj de la historio de la portugala, prezentante la tuton kiel vivantan vortstokon de la parolata nuntempa lingvo en Brazilo.

La ekzisto de du oficialaj ortografioj, nome tiu portugalia kaj tiu brazila, estas konsiderata motivo de malhelpo por internacia unuigo de la portugala lingvo kaj por ties prestiĝo en la monda scenejo. Tia situacio estiĝis en 1911, kiam Portugalio validigis sian unuan grandan ortografian reformon sen konsulti Brazilon.

En Brazilo la lasta granda lingva reformo okazis en 1971 cele pli proksimigi la skribmanieron de ambaŭ landoj. Tiam pli ol du trionoj da supersignoj, kiuj kaŭzis miskomprenojn, estis forigitaj. Tiamuloj miris pri la kiomo da ŝanĝoj en la lingvo, kaj ĝis nun multaj personoj ankoraŭ skribas per tia antaŭreforma ortografio de la 1970-a jaro.

Laŭ ortografia vidpunkto, ekzistas iuj reliefaj diferencoj en la skribmaniero ne nur de tiuj du landoj, sed ankaŭ de tiuj aliaj ses nacioj de la Komunumo de Portugallingvaj Landoj. Indas memorigi, tamen, ke la prononco, vortprovizo kaj sintakso de ĉiuj apartaj landoj de la Portugallingva Komunumo tenos sin tiaj kiaj ili estas. La novaĵoj koncernos nur la unuformigon de la skribo de kelkaj vortoj.

En Brazilo, ĉiujenlandaj tekstoj produktitaj ekde 2009 devos esti presitaj laŭ la novaj lingvaj reguloj. Universitataj ekzamenoj, konkursoj kaj taksaj ekzamenoj povos akcepti ambaŭ skribojn, kiel ĝustajn, ĝis la 31-a de decembro 2011.

Koncerne didaktikajn librojn, okazos reordigo. Ekde la jaro 2010 la lernantoj de la 1-a ĝis la 5-a jaro de la fundamenta instruado ricevos la librojn laŭ la nova normo - kio ankaŭ okazos al la klasoj de la 6-a ĝis la 9-a jaro, respektive en 2011 kaj 2012.

Fontoj:

<http://www.academia.org.br>

www.g1.com.br

Tufano, Daouglas - Guia Prático da Nova Ortografia, Melhoramentos, 2008.

Manual da nova ortografia: speciala eldono, Nova Escola, aŭgusto 2008.

Kio ŝanĝiĝos por brazilanoj,
laŭ la nova Ortografia Interkonsento?

Alfabeto

Ĝi gajnos tri literojn:

Antaŭe	Poste
23 literoj: <i>a, b, c, d, e, f, g, h, i, j, l, m,</i> <i>n, o, p, q, r, s, t, u, v, x, z.</i>	26 literoj: aldoniĝos <i>k, w</i> kaj <i>y</i>

Akcentado

Akuta supersigno 1 – malaperos la signo super la malfermitaj diftongoj **éi** kaj **ói** de la paroksitonaj vortoj (tiuj, kies antaŭlasta silabo estas la plej forta):

Antaŭe	Poste
<i>Européia, idéia, heróico, apóio, bóia, asteróide, estréia, jóia, platéia, paranóia, jibóia, assembléia</i>	<i>Europeia, ideia, heroico, apoio, boia, asteroide, Coreia, estreia, joia, plateia, paranoia, jiboia, assembleia</i>

Rimarko: Oksitonaj vortoj kiel *herói, papéis, troféu* konservos sian supersignon (ĉar ilia plej forta silabo estas la lasta).

Akuta signo 2 – malaperos la signo super la fortaj *i* kaj *u* post diftongoj (kunigo de du vokaloj en sama silabo), en paroksitonaj vortoj:

Antaŭe	Poste
<i>Baiúca, bocaiúva, feiúra</i>	<i>Baiuca, bocaiuva, feiura</i>

Rimarko: Se *i* kaj *u* aperos en la lasta silabo aŭ formos hiaton (apudigo de du akcentitaj vokaloj) ne sekvatan de diftongo, tiam konserviĝos la supersigno kiel en: *Piauí, baú, saída*.

Akuta signo 3 – malaperos la signo super la forta **u** en la grupoj **gue, gui, que, qui**, en verboj kiel *averiguar, apaziguar, arguir, redarguir*:

Antaŭe	Poste
<i>Averigúe, apazigúe, ele argúi, elas redargúem</i>	<i>Averigue, apazigue, ele argui, elas redarguem</i>

Rimarko: la antaŭa prononco de tiuj vortoj konserviĝos.

Cirkunfleksa signo – malaperos la cirkumflekso de vortoj finiĝantaj per **êem** aŭ **ôo** (akompanataj aŭ ne de pluralo):

Antaŭe	Poste
<i>Crêem, dêem, lêem, vêem, prevêem, vôo, enjôos</i>	<i>Creem, deem, leem, veem, preveem, voo, enjoos</i>

Rimarko: Nenio ŝanĝiĝos en la akcentado de la verboj **ter, vir** kaj iliaj derivaĵoj: *eles têm, ele vêm*.

Diferenciga signo – signo (akuta aŭ cirkunfleksa) per kiu oni diferencigas vortojn kun sama prononco, sed kun malsama signifo. Tia signo ne plu estos uzata:

Antaŭe	Poste
<i>Pára, péla, pêlo, pólo, pêra, côa</i>	<i>Para, pela, pelo, polo, pera, coa</i>

Rimarko 1: en du vortoj tamen la diferenciga signo konserviĝos – super la verbaj formoj *pôr*, cele diferencigi ĝin disde la prepozicio *por*, kaj *pôde* (pasinta tempo), cele diferencigi ĝin de *pode* (estanta tempo).

Rimarko 2: Koncerne la vortojn *fôrma/forma*, la diferenciga signo estos laŭvola.

Tremao – Du-punkta grafika signo uzata super la vokalo *u* por indiki, ke tiu litero estu prononcata. Ĝi malaperos el la portugala lingvo. Nepras memoriĝi, tamen, ke la antaŭa prononco konserviĝos:

Antaŭe	Poste
<i>Freqüente, lingüiça, agüentar</i>	<i>Frequente, linguïça, aguentar</i>

Rimarko: en fremdaj nomoj kiel *Müller*, ĝi konserviĝos.

Streketo

Kunmetitaj vortoj

Vidu la ĉefajn regulojn pri la streketo kune kun prefiksoj:

Prefiksoj	Oni uzos la streketon	Oni ne uzos la streketon
<i>Agro, ante, anti, arqui, auto, contra, extra, infra, intra, macro, mega, micro, maxi, mini, semi, sobre, supra, tele, ultra...</i>	Kiam la sekva vorto komenciĝas per h aŭ per vokalo egala al tiu lasta de la prefikso: <i>auto-hipnose, auto-observação, anti-herói, anti-imperialista, micro-ondas, mini-hotel</i>	En ĉiuj ceteraj kazoj: <i>autorretrato, autossustentável, autoanálise, autocontrole, antirracista, antissocial, antivírus, minidicionário, minissaia, minirreforma, ultrassom</i> Rimarko: kiam la prefikso finiĝos per vokalo kaj la dua kunmetaĵo komenciĝos per s aŭ r , tiam la konsonanto nepre duobliĝos.

<i>Hiper, inter, super</i>	Kiam la sekva vorto komenciĝos per h aŭ r: <i>super-homem, inter-regional</i>	En ĉiuj ceteraj kazoj: <i>hiperinflação, supersônico</i>
<i>Sub</i>	Kiam la sekva vorto komenciĝos per b, h, aŭ r: <i>sub-base, sub-reino, sub-humano</i>	En ĉiuj ceteraj kazoj: <i>subsecretário, subeditor</i>
<i>Vice</i>	Ĉiam: <i>vice-rei, vice-presidente</i>	
<i>Pan, circum</i>	Kiam la sekva vorto komenciĝos per h, m, n aŭ vokaloj: <i>pan-americano, circum-hospitalar</i>	En ĉiuj ceteraj kazoj: <i>pansexual, circuncisão</i>

Fontoj:

Prof. Sérgio Nogueira, Guia da reforma ortográfica: www.g1.com.br

Manual da nova ortografia: speciala eldono, Nova Escola, aŭgusto 2008.

fructo teatro orthographia

diccionario atriz

lyrio baptizar

assignatura

acção

Historio pri la lingvaj reformoj en la portugala

herva

christallino

phleugma

lythographia

Pharmacia

Ĝis komenco de la 20-a jarcento Portugalio kaj Brazilo uzis saman skribmanieron laŭ la etimologio de latin- kaj grek-devenaj radikoj.

1907

Brazila Beletra Akademio komencas simpligi la skribadon en siaj publikigaĵoj.

1911

Unua ortografia reformo fare de Portugalio, sen konsulti Brazilon, el kio rezultis du ortografioj.

1915

Brazila Beletra Akademio decidas harmoniigi ambaŭ ortografiojn.

1919

Brazila Beletra Akademio nuligas la rezolucion de 1915.

1929

Brazila Beletra Akademio modifas la regulojn por skribado.

1931

Unua konsento inter Portugalio kaj Brazilo cele unuformigi la ortografion en ambaŭ landoj. La Interkonsento tamen ne aplikiĝis en la praktiko.

1943

Redaktado, en Brazilo, de la *Ortografia Norma* surbaze de la Ortografia Interkonsento de 1931.

1945

Plia ortografia interkonsento fariĝas leĝo en Portugalio, sed ne en Brazilo, kies registaro ne ratifis la dokumenton kaj plu uzas la ortografion de 1943.

1971

Nova ortografia reformo en Brazilo interkonsente kun Portugalio, per kiu oni draste malpliigas la diferencojn en la ortografioj de ambaŭ landoj.

1973

Portugalio ratifas la Ortografian Reformon de 1971.

1975

Malsukcesas provo por nova ortografia konsento inter Portugalio kaj Brazilo.

1981

Publikigo de la unua eldono de "Vortaro pri la Ortografio de la Portugala" (VOLP), kun 340 mil artikoloj, fare de la Brazila Beletra Akademio, sub orientado de Antônio Houaiss.

1986

Plua malsukcesa ortografia interkonsento, ĉi-foje kun reprezentantoj de aliaj kvin portugallingvaj landoj (Angolo, Kaboverdo, Gvineo-Bisaŭo, Mozambiko kaj San-Tomeo kaj Princo) ĵus konkerintaj siajn politikajn sendependecojn.

1988

Propono de projekto por unuformigo de la ortografioj de ĉiuj portugallingvaj landoj.

1990

Akademio pri Scienco de Lisbono kunsidigas reprezentantojn de sep portugallingvaj landoj por elaborado de la *Ortografia Interkonsento de la Portugala Lingvo*.

1996

La Ortografia Interkonsento estas ratifita nur de Portugalio, Brazilo kaj Kaboverdo.

2004

Reprezentantoj de la Komunumo de Portugallingvaj Landoj (portugale, CPLP) subskribas novan protokolon, per kiu oni aprobas la aliĝon de Orienta Timoro kaj amendon, kiu garantias la validigon de la Ortografia Interkonsento, kondiĉe ke almenaŭ tri el la portugallingvaj landoj ratifu la dokumenton.

Brazila Beletra Akademio aperigas la 4-an eldonon de sia *"Vortaro pri la Ortografio de la Portugala Lingvo"* (VOLP).

2008

La Ortografia Interkonsento de 1990 estas aprobita de Brazilo, Kaboverdo, Portugalio kaj San-Tomeo kaj Princo.

2009

El la kvar landoj ratifintaj la *Ortografian Interkonsenton de la Portugala Lingvo*, nur Brazilo devigas siajn enlandanojn adaptiĝi al la Nova Ortografia Reformo.

Brazila Beletra Akademio Eldonas ĝisdatan "*Vortaro pri la Ortografio de la Portugala Lingvo*" (VOLP), laŭ la nova ortografio.

fontoj:

<http://www.academia.org.br/>

<http://www.portaldalinguaportuguesa.org/?action=acordo-historia>

http://pt.wikipedia.org/wiki/Acordo_Ortoqr%C3%A1fico_de_1990

Presita kaj bindita ĉe
Oportuno

ZAMENHOF A JARO



D-ro L. L. Zamenhof
(1859 - 1917)

La kreinto de Esperanto havas interesan historion por rakonti okaze de la 150-jara jubileo de sia naskiĝtago...

... kaj vi havos la tutan jaron 2009 por rerakonti ĝin al viaj lernantoj!